



PENSEO

N-ro 317

mar. / 2018

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 29-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Tiberio Madonna (Italujo)



LA ORTAJ VORTOJ

Dediĉita al Paulo Silas

La literoj
formis silabojn
la silaboj
konstruis vortojn
la vortoj
komponis versojn
la versoj
naskis poemojn
la poemoj
plenigis paĝojn
la paĝoj
produktis kajerojn
revuojn librojn
elektronikajn retejojn
en kiuj
la skribitaj vortoj
dancis kune
por diri al ĉiuj
vian doloron
vian koleron
por esprimi la mondon
tra viaj okuloj
por rakonti la trajnon
de viaj pensoj.
Ili vojaĝis
de leganto al alia
por disvastigi
ĉiun emocion
kiu eskapis
el vi.
Ili kuradis

portante tra l' landoj
ĉiun senton
de sia patro.
Kaj la vortoj multiĝis
skribataj senĉese
de l' fekundaj fingroj
de viaj manoj
kiuj
neniam lacaj
faris kaj diris
produktis kaj naskis
disŝutis la fruktojn
de via pensado
kaj dissemis ĉirkaŭen
viajn filojn:
la vortojn spontanajn
de viaj poemoj.
Vi verkis
kaj verkadis
kaj pluaj vortoj
atendis naskiĝi.
Sed nun
abrupte
ĉio interrompiĝas
kaj finiĝas.
Kial?
La vortoj jam skribitaj
atendis la naskiĝon
de siaj fratoj
atendis ankoraŭan paroladon
de sia patro
por daŭri doni voĉon
al vi
kune kun la novaj.
Kontraŭe
la halto subita
disverŝas la nokton

kaj estingas la fajron.
 Kaj nun
 la orfaj vortoj
 krias en la frosto
 kiu ilin premezas
 krias al la aero
 kiu ilin sufokas
 krias al siaj fratoj
 kiuj neniam naskiĝis
 krias al sia patro
 kiu ne plu estas.
 La vortoj de l' poemoj
 restintaj sen sia kreinto
 malesperas kaj ne komprenas
 kial.

PRINTEMPO

Printempo.
 La suno pentras
 la longajn striojn de l' ĉielarko
 el delikataj farboj
 per penikoj
 el akvo.
 La friska aero
 postpluva
 rekolorigas la herbon kaj la florojn
 de l' ĝardenoj
 per koloroj
 pli intensaj kaj feliĉaj.
 La papilioj
 demandas sin
 kun batantaj aloj
 kial tiuj brilaj petaloj
 tiel similaj
 al ili
 ne flugas.
 Kaj dume
 ili riĉigas l' aeron ĉirkaŭan
 per vivaj
 dancantaj koloroj.
 Estas nia tasko
 kapabli ilin rimarki.

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Bonvenon al paradizo!

Mi estas ĉi tie, kara filino! Ĉu vi ne vidas min?
 Mi vekigas lume el la sino de l' montaro,
 kaj miaj kreitaĵoj vin salutas verdrakume.

Miaj okuloj ridetas al vi el ĉiu folio de l' arboj,
 humilaj majestoj, kiuj ame vin kontemplas,
 dum la floroj sonĝas en simfonio el parfumoj.

Mi estas la bunta gajeco de l' birdoj kaj
 papilioj,
 la forto de l' akvofaloj, la saĝeco de l' ŝtonoj,
 la kvieteco de l' lagoj, la brua persistado de l'
 riveroj.
 Silento estas mia mistero, kiu nun gastigas
 vian koron.



Juiz de Fora, 19/02/2018.

Hans-Georg Kaiser (Germanujo)



Kio ĝravas?

Se verkisto vorte pavas,
 liaj vortoj ne tre gravas.
 Ĉu, se vortoj sencon havas,
 tiuj vortoj ĉiam ravas?

Kio gravas, kiu pavas,
 kio homojn vere ravas?
 Pluajn dubojn mi eĉ havas.
 Eble ĉiu homo gravas.

Eble gravas la atomoj,

tiom, kiom ni, la homoj.
Eble ĉiu stelo gravas,
eĉ se ĝi ne sencon havas.

Kio plu je vero gravas,
se la parolanto pavas?
Se vi pavas, ĉu vi gravas,
ĉar pavuloj ĉiam pravas?

Kaj se homo mem decidas,
ĉu li plu gravecon fidas?
Ĉu la mondo tuj pereus,
se la hom' gravulojn neus?

Certe gravas kre-pasio
pli ol vanta mondkonscio.
Kaj homara harmonio
li ol nur laborpasio.

Wally du Temple (Kanado)



Forglitos Urboj

Pri la urba fiziko de glaciglitoj,
Pro degelo forglitos Londono ŝajne
Mahattan, Mumbai, Pacifikaj insuloj kiu ajn
Ili forglitos maren post diskreviĝo de
polusglaĉeroj
Kiam montsupraj glaĉeroj iĝas glaciriveroj
Pro aŭtoj, aviadiloj, industrioj, polucioj, avidaj
homoj, kaj egooj
Forglitos glacio kaj loĝkvartaloj de Islando.
Degelos, kaj forglitos la glaciejoj de
Groenlando
Ĝis avko inundas nazotruojn niajn,
Kiam digoj, kaj domfostoj ne pli utilos.
Teruloj sen tero naĝos kiel fiŝoj
Inter la rubaj flosaĵoj de dronantaj metropoloj.
Forglitos Ateno, Rangoon, Vankuvero
Ĉielskrapuloj pinte restos kiel hompostsignoj
Sen vivaj kaj kadukaj kiel la detruita regno de
Ozymandias

Ĝis nenio plia restas kaj ĉirkaŭe
Nur la blua maro etendiĝas ĝis la horizonto.
Sube restos fabelaj rakontoj de iamo
Kiel imagoj pri Atlantido subakviĝinta
Literaturo, arkitekturo, belarto, ĉu vere estis?
Ĉu io leviĝos denove kiel fetu el la fekunda
utero de la maro?

INTERNACIA ESPERANTA LITERATURA KONKURSO "HRISTO GOROV – HRIMA"

Hristo Gorov – Hrima estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson. En la konkurso povos partopreni geesperantistoj el ĉiuj landoj.

La konkurso estos por *rakonto kaj eseo*.

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu rakonto aŭ per unu eseo, originale verkitaj en Esperanto.

La rakontoj kaj la eseoj estu ĝis 4-paĝaj, komputile kompostitaj.

La konkurso ne havas apartan temon.

La gajnintoj ricevos valorajn premiojn.

Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 30-a de septembro 2018 al adreso: e-mail: modest@abv, bg aŭ per la poŝto al adreso: Georgi Mihalkov, Sofio – 1229, "Vrabnica" 1, bl. 529 vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario

Chang Jian (708-?)

Dediĉe al la posta korto de la templo Poshan

Matene la antikvan templon mi vizitas,
Krepuska suno super arboj montaj brilas.
Al izolejo la sinua pad' sin gvidas,
Kabanojn bonzajn pompaj plantoj jen
desfilas.
Al folaj birdoj plaĉas hela sunradio,
Ĉe l' ombra lago homo pacas en la zeno.
Silentas ĉiuj elementoj de l' medio,
Nur kultaj sonoriloj sonas en refreno.

elĉinigiŝ



Minosun (Ĉinujo)

Mori (Usono)



AFORISMO (29)

Pro krimoj de
malsatuloj
respondecas
ŝtatuloj.

Politikistoj
samkiel ŝtelistoj
plibone ĉion
performas
kiam popolanoj
dormas.

Ju pli silenta
via menso
des pli granda
via potenco.

Memfida,
silenta
kaj nobla persono
estas potenca kvazaŭ
leono.

Homo
kun la plej baza
homa kulturo
ne vivas kiel
vulpo, lupu,
vulturo.

Tio, kio diferencigas
leonojn disde vulpo,
lupu,....
kaj hieno
estas grandioza,
potenca sinteno.

Nek trono

nek fanfaronoj
necesas por ke leono
estu leono
kontraŭe al etmensa
malgrandanima
persono.

Homo
pro ĵaluzo kaj envio
povas esti danĝera
kiel skorpiono.

Amikeco ne eblas
kun vulpo ruza
kaj homo ĵaluzo.

Diktatoro
estas kiel hieno
sur la trono de
leono.

Se vi havas almenaŭ
unu amikon
kiu fidele helpas vin
en l' tempo de bezono
vi ja estas feliĉa
persono.

Tie, kie bataloj
de malriĉa,
malfeliĉa persono
estas nur lia
persona batalo
oni vivas
laŭ l' leĝo de ĝangalo.

Por esti Homo
ne sufiĉas nomo
homo devas agi
kiel homo.

Skorpiono
pli bonas ol tiu
kiu pikas kaj murdas

en la nome de Dio.

Homo, kiu kredas
fanatike
je sia religio
aŭ ideologio
estas preta piki
blinde,
samkiel skorpiono.

Amo estas
la tuta religio
de Dio.

Por vivi vian vivon
senkonflikte,
feliĉe
amu ĉiun homon
senkondiĉe.

Ne nur en prizono
homo estas
mallibera persono.

Homo
kiu ja devas
labori
ĝismorte
por iom da pano
estas ja mallibera
homarano.

Bona poemo
estas tiu
kiu bongustas
kiel dolĉa pomo.

Animaloj
en ĝangalo
estas pli liberaj
ol homoj
en nia bela kapitalo.

Bona persono

sur alta posteno
aŭ kun multe da mono
ĉiam kondutas
kiel afabla,
modesta persono.

La plej afabla,
nobla persono
estas tiu, kiu fordonas
la lastan groŝon en sia
poŝo.

La mondo plenas
je kanibaloj
kiuj troviĝas
interalie
en dancohaloj.

Tiuj, kiuj murdas,
torturas,
ekspluatas
kaj suferigas homojn
nome de Dio
estas pli abomenindaj

ol skorpio.

Tiu, kiu regas
nome de Dio
estas fripono
kaj tion kredas
stulta persono.

Riĉa
potenca
kaj orgojla homo
memorigas min
pri putra terpomo.

Infero
estas tie, kie laboruloj
vivas en mizero.

Riĉulo
justa
modesta
kaj afabla
estas bela kaj kara
sed rara.

Politikisto kolera
estas la plej danĝera.

Saĝaj generaloj
faras ĉion eblan
kontraŭ ekbatalo.

Amoplena koro
la plej valora
trezoro.

Pri grava afero
decidu per kapo racia
ne per koro emocia.

Veneno
kaj kolero
danĝeras por
via koro.



kie sidanta restas mia volo?

PAPOS NASCENTES (Brazilo)



Ne renkonto

ia penso troa
mia sento senbrida
mia ŝveninta volo

sendorma, mia penso pepas pepas pepegas
malkonstanta, mia sento silentas
maldiligenta, dormetas mia volo

turbinata, mia penso diskuregas
frenozega, mia sento ridegas
distriĝema, lamas mia volo

mia penso uzino de poemoj?
mia sento remaĉas kiujn problemojn?

sendorma malkonstanta maldiligenta
turbinata frenozega distriĝema
ĉu mia poemo perdas forton?
kiu problemo min zumtedadas?
sidanta medite mi min demandas

pri tiu malkomforto kiu senco?

Flamo vera

Flamo Mi Estas
cetero nur iluzia limo
cerba fikcio

malekzistas limo landlimo
por flugo naĝo en cerboj
birdaj fiŝaj

senlime plia efiko
 kora komuniko
 interlingvas

homflugo naĝo ĉu dependas de
 aĝo?
 onin liberas homa fantazio:
 enkore jen realo de Poezio.

Takashi Ito (Japanujo)



Trista lunlumo

trista lunlumo ...
 verda musko formanĝas
 senliman tempon

aŭtuna tago ...
 nia ĝuo aŭskulti
 latuno-bandon

fabriko fumas ...
 jen, transe de la eĝo
 aŭtuna luno

ruĝaj folioj ...
 mia volo sidiĝi
 sur laga benko

aŭtuna pado ...
 jen leviĝanta suno
 fermi okulojn

Ivaniĉka Maĝarova (Bulgario)



Unu steleto
 estingiĝis en la ĉiel'.
 Pardonpetis mi.
 *
 Arĝentspegulo

vian vizaĝon strekas.
 Kandel' finbrulas.
 *
 Sur tombo rozo –
 spirado pro la amo.
 Dolor' en l'anim'.
 *
 Paro sur bordo.
 Varma sablo. Amo kaj...
 Laroj rondflugas.

Zhuangzi (369-286 a.K)



Zhuangzi

ĈAPITRO DEKTRIA

La Taŭo de la ĉielo

§13-01

La Taŭo de la ĉielo konstante moviĝas, tiel ke ĉiuj estaĵoj en la mondo ekzistiĝas. La Taŭo de la suvereno konstante funkcias, tiel ke ĉiuj homoj en la mondo kolektiĝas sub li. La Taŭo de la saĝulo konstante manifestiĝas, tiel ke ĉiuj homoj sin submetas al li. Tiu, kiu scias la Taŭon de la ĉielo, plene komprenas la doktrinojn de la saĝuloj kaj komplete kaptas la virtojn de la reĝoj kaj imperiestroj, agas spontanee el si mem, silente kaj trankvile. Lasante ĉiujn estaĵojn en la mondo nature kreskadi, li tenas sian menson ĉiam en kvieteco kaj senzorgeco. La saĝulo tenas sian menskvietecon ne pro tio, ke la kvieteco estas bona por li kaj sekve li tenas kvietan menson, sed nur tial, ke nenio en la mondo povas ĝeni lian mensan kvietecon. Kiam la akvo estas kvietaj, ĝi povas reflekti la barbon kaj la brovojn, kaj ĝia supraĵo povas servi kiel nivelilo de la majstra ĉarpentisto. Se la akvo povas esti tiel kvietaj kaj klara, eĉ pli tia devas

esti la homa spirito! La kvieteco, la indiferenteco kaj la saĝulo estas spegulo, kiu reflektas la ĉielon kaj la teron, spegulo, kiu reflektas ĉion en la mondo.

La malpleno, la kvieteco, la indiferenteco kaj la senagado estas la niveliloj de la harmonio de la ĉielo kaj la tero, kaj ankaŭ la plej altaj kriterioj de la Taŭo kaj la virto. Tial la imperiestroj, la reĝoj kaj la saĝuloj trovas en ili ripozon. Kiam ili estas en ripozo, ili estas malplenaj; kiam ili estas malplenaj, ili estas plenaj; kiam ili estas plenaj, ili estas en perfekta konformiĝo al la naturo. Kiam ili estas malplenaj, ili estas kvietaj; kiam ili estas kvietaj, ili povas fari ion ajn; kiam ili povas fari ion, ili povas atingi ion. Kiam ili estas kvietaj, ili estas en senagado; kiam ili estas en senagado, la regnoficistoj konscience plenumas ĉiun sian funkcion. Kiam ili estas en senagado, ilia koro estas en facileco. Tiuj, kiuj havas facilan koron, estas liberaj de zorgoj kaj maltrankvilo, kaj sekve ĝuos longan vivon.

La malpleno, la kvieteco, la indiferenteco kaj la senagado konsistigas la principon de ĉiuj estaĵoj de la mondo. Tiuj, kiuj komprenas tion kaj tenas la tronon, povas fariĝi tiaj, kia estis la suvereno Yao. Tiuj, kiuj komprenas tion kaj servas kiel ministroj povas fariĝi tiaj, kiaj estis la ministroj sub la suvereno Shun. Tenu tiun ĉi principon en alta pozicio estas la virto por la imperiestroj kaj la reĝoj; tenu tiun ĉi principon en malalta pozicio estas la vivmaniero por la ermitaj saĝuloj kaj la senkronaj reĝoj. Tiuj, kiuj, tenante la principon, ekŝiĝas el sia posteno kaj vojaĝas ĉie en la lando, povas ĝui la respekton de la ermitoj; tiuj, kiuj, tenante la principon, regas super la mondo, povas distingiĝi per siaj meritoj kaj unuigi la landon. Esti kvieteco signifas esti saĝulo; esti agemo signifas esti reĝo. Sekvi la senagadon egalas esti respektata; esti simpla kaj pura egalas atingi la perfektan bonon en la mondo.

La klara kompreno de la virto de la ĉielo kaj la tero estas nomata "la plej fundamenta principo", kiu signifas "harmonion kun la naturo". Efektivigi egalecon kaj akordiĝi kun la mondo estas harmoniigi kun la homoj. Harmoniigi kun la homoj estas nomata la "homa ĝojo"; harmoniigi kun la naturo estas nomata la "ĉiela ĝojo".

Zhuangzi diris:

"Ho, mia Majstro! Ho, mia Majstro! Vi intermiksas ĉiujn estaĵojn en la mondo, sed ne el la justeco; vi donas eternajn favorojn, sed ne el la humaneco; vi estas pli aĝa ol la praa antikveco, sed vi ne estas maljuna; vi kovras la ĉielon, subtenas la teron kaj skulptas ĉiujn formojn, sed vi montras nenian lertecon. Tio estas nomata la ĉiela ĝojo.

"Tial, kiel estas dirite, 'Tiu, kiu komprenas la ĉielan ĝojon, sekvas la naturon dum sia vivo, ŝanĝiĝas kun ĉio en la mondo ĉe sia morto, dividas la virton de la jino en sia kvieteco kaj dividas la movadon de la jango dum sia agado.' Tial tiu, kiu komprenas la ĉielan ĝojon, suferas nek plendojn de la ĉielo, nek mallaŭdojn de la homoj; li ne implikiĝas en mondecaj aferoj, nek fariĝas la objekto de riproĉoj de fantomoj kaj spiritoj.

"Tial oni diras ankaŭ: 'Kiam li moviĝas, li estas kiel ĉiela korpo; kiam li kvietas, li estas kiel la tero mem. Kiam lia menso absorbiĝas en la Unu, li fariĝos la reĝo super la mondo. Lia fizika formo ne suferos malsanon kaj lia spirito ne laciĝos. Kiam lia menso absorbiĝas en la Unu, ĉiuj homoj en la mondo submetiĝos al li.' Tio signifas, ke li etendas sian malplenecon kaj kvietecon al la ĉielo kaj la tero, al ĉiuj estaĵoj en la mondo. Tio estas nomata la ĉiela ĝojo. La ĉiela ĝojo enkorpigas la menson de la saĝulo, menson, per kiu li nutras la mondon."

La virto de la imperiestroj kaj la reĝoj prenas la ĉielon kaj la teron kiel sian radikon, la moralon kiel sian trunkon kaj senagadon kiel sian normon. Dank' al la senagado la imperiestroj kaj la reĝoj regas super la mondo kaj havas sian senokupan tempon. Agadante la suverenoj kaj la ministroj ŝarĝis sin per mondecaj aferoj kaj ne havas sufiĉan tempon. Tial la senagado estis honorata en la antikveco. Se la suvereno sekvas la senagadon kaj ankaŭ la ministroj sekvas la senagadon, la ministroj dividas la saman virton kun la suvereno. Dividante la virton kun la suvereno, la ministroj plenumas siajn devojn ne kiel ministroj. Se la ministroj estas en agado kaj ankaŭ la suvereno estas en agado, la suvereno dividas la virton kun la ministroj. Dividante la virton kun la ministroj, la suvereno plenumas sian devon ne kiel suvereno. La

suvereno devas sekvi la senagadon por regi super la mondo; la ministroj devas esti en agado por servi la suverenen. Tio estas eterna principo.

Tial tiuj, kiuj regis super la mondo en la antikveco, ne uzis sian inteligenton eĉ se ili posedis ĉion-ampleksan sciadon; ili ne parolis eĉ se ili havis grandan konvinkan elokventecon; ili ne mem sin okupis je aferoj eĉ se iliaj kapabloj superis tiujn de ĉiuj, kiuj vivis en la mondo.

La ĉielo donas nenian naskon, kaj tamen ĉiuj estaĵoj en la mondo estiĝis el ĝi; la tero ne intencas kreskigi, kaj tamen ĉiuj estaĵoj en la mondo estas nutrataj de ĝi; la reĝo faras neniajn agojn, kaj tamen la mondo estas bone regata de li. Tial oni diras: “Nenio estas pli mistera, ol la ĉielo; nenio estas pli fekunda, ol la tero; kaj neniu estas pli granda, ol la reĝo.” Kaj tial oni diras ankaŭ: “La virto de la imperiestroj kaj la reĝoj rivalas kun la ĉielo kaj la tero.” Tio estas la ĝusta maniero jungi la ĉielon kaj la teron, subigi al si ĉiujn estaĵojn en la mondo kaj regi super la popolo.

La Taŭno kaj la virto ekestis jam en la tempo nememorebla, dum la humaneco kaj la justeco estis praktikataj en la tempo multe pli malfrua. La esenco de la politiko venas el la manoj de la reĝo, dum la detaloj venas de la ministroj. Uzi armilojn estas la akcesora formo de la virto; rekompenci kaj puni estas la akcesora formo de la edifo; praktiki ritojn kaj leĝojn estas la akcesora formo de la regado; aŭskulti la muzikon de sonoriloj kaj tamburoj kaj rigardi la ornamaĵojn el plumoj kaj pelto estas la akcesora formo de la ĝojo; la ploro kaj la funebro estas la akcesora formo de la malĝojo. Tiuj ĉi kvin akcesoraj formoj, por esti efikaj, postulas la partoprenon de la menso kaj la spirito. Tiuj ĉi kvin akcesoraj formoj ekzistas jam de la antikva tempo, sed ili ne estas rigardataj kiel esencaj.

La reĝo iras antaŭe kaj la ministroj lin sekvas; la patro iras antaŭe kaj la filo lin sekvas; la pli aĝa frato iras antaŭe kaj la pli juna lin sekvas; la pliaĝulo iras antaŭe kaj la plijunulo lin sekvas; la edzo iras antaŭe kaj la edzino lin sekvas. La distingo pri la rango kaj la antaŭec-raĵto similas la pozicion de la ĉielo kaj la tero, kaj la saĝulo prenas ĝin kiel la modelon. La ĉielo estas alta supre kaj la tero estas malalta sube — tio estas

antaŭdestinita pozicio. Printempo kaj somero iras antaŭe kaj aŭtuno kaj vintro ilin sekvas — tio estas sinsekva ordo de la kvar sezonoj. La transformiĝo kaj la evoluo de la estaĵoj en la mondo havas siajn distingajn signojn; iliaj kresko kaj malkresko estas nur fazoj de ŝanĝado. Se la ĉielo kaj la tero, kiuj estas la plej sanktaj, havas sian distigon pri rango kaj ordo, des pli havas tian distigon la maniero de la homa vivo! La sangparencaj rilatoj estas honorataj en la pratempaj temploj; la altrangeco estas honorata en la kortego; la pliaĝeco estas honorata en la najbaraĵo; la saĝeco estas honorata en la kondukado de aferoj — ĉio ĉi tio estas la ordo en la Taŭno. Tiu, kiu parolas pri la Taŭno sen menciigi ĝian ordon, ne sekvas la Taŭnon en ties vera senco.

Tial en la antikveco tiuj, kiuj komprenigis sin pri la Taŭno, penis ekkompreni unue la ĉielon, poste la Taŭnon kaj la virton, pli poste la humanecon kaj la justecon, kaj pli poste la personajn devojn kaj respondecojn, kaj pli poste la formojn kaj nomojn, kaj pli poste la nomumadon laŭ kompetenteco, kaj poste la observadon, kaj poste la distigon inter la ĝusteco kaj la malĝusteco, kaj fine la rekompencoj kaj la punon. Se la rekompencoj kaj la punoj estis bone farataj, la saĝaj kaj la kompetentaj kaj la nekompetentaj trovis ĉiu al si konvenan lokon, la noblaj kaj malnoblaj kontente restis ĉiu en sia propra pozicio, kaj tiamaniere la induloj kaj la neinduloj estis komisiitaj plenumi ĉiu sian funkcion en sia ofico. Estis necese distingi iliajn kapablojn kaj konsideri iliajn titolojn kaj poziciojn. Tio estis la ĝusta maniero servi la regon, nutri la popolon, regi la mondon kaj kulturi sin mem. Ĉar neniaj artifiko kaj intrigoj estis uzataj, estis tute nature, ke oni vivis laŭ sia naturo. Tio estis nomata “granda paco”, la perfekteco de la regado.

Tial estas skribite en antikva libro: “La objektoj havas sian formon kaj nomon.” La formo kaj la nomo estis menciitaj de antikvuloj, sed ili estis metitaj ne sur la unuan lokon. Kiam la antikvuloj menciis formon kaj nomon, ili listiĝis en la kvina rango en la hierarkio de la Taŭno, kaj la rekompenco kaj la puno en la naŭa. Se la formo kaj la nomo estus menciitaj ĝuste en la komenco, oni ne komprenus ilian radikon; se la

rekompenco kaj la puno estus menciitaj ĝuste en la komenco, oni ne komprenus ilian originon. Tiuj, kiuj parolas aŭ argumentas en la inversa ordo, estas regatoj de aliaj. Kiel do ili povus regi aliajn! Tiaj homoj scias nur la rimedojn de la regado, sed ne ĝian fundamentan manieron; ili povas servi la mondon, sed ne povas regi super la mondo. Ili estas nenio pli ol sofistoj, homoj kun tre limigita opinio. La ritoj, la leĝoj, la formoj kaj la nomoj ja estis menciitaj de la antikvuloj, sed ili estis uzataj por servi la reĝon, ne por regi super la popolo.

elĉinigris



Wang Chongfang

(Ĉinujo)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)



Tri maksimumoj

el la rakontoj pri Afanti
—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Por vivpan’
Afanti kun ŝnur’
iris al bazaro por
dunganton kun kora pur’
kaj favoro nur.

Li staris
por taglaboro
kaj rigardis ĉirkaŭen.
Alvenis grandsinjoro
kun ruza koro.

Deklaris
li malĝentile
jen al laborseĉantoj:
“Aŭskultu min trankvile

kaj senbabile.

Aĉetis
mi je alta prez’
keston da glasoj luksaj,
kiu volas kun komplez’
por buŝa enspez’

dorsporti
al mia domo.
Mi donos tri maksimumojn
je mia nobla nomo
al li, sen mono.

Neniu
reagis jese,
sed Afanti konsentis
dorsporti ĝin promese
kaj sinforgese.

Afanti
jen kun granda pen’
dorsporti l’ keston fine
ĝis la riĉula ĝarden’
de bela teren’.

Li petis
de la riĉulo
tri plej altajn maksimumojn
jen per sia postulo
kun avid-brulo.

“Aŭskultu
laŭ via ŝato,”
La riĉulo do diris:
“La diron, ke malsato,
ho, mia frato,

ol sato,
ne kredu ĝua.”
“Bone!” diris Afanti,
“Kio estas la dua?
Jen mi senbrua!”

“La diron
ne kredu tute,
ke piediri bonas
pli ol rajdi ĝoj-lude,
ne absolute!”

“Pravege!
Jen akceptas mi
tiujn brilajn konsilojn!
Kaj la tria opini’
de l’ saĝa radi’?”

Daŭrigis
la riĉulo jen:
“Tion neniel kredu,
ke malsaĝas ne azen’
pli ol vi en splen’.”

Aŭdinte
tion kolere,
Afanti lasis ŝnuron.
Kraak! La kesto libere
falas sufere

surteren.
Afanti moke
fingromontrante l’ keston,
ja maksimis provoke
kaj solid-roke:

“La diron
plene kredu ne,
ke tiuj glasoj tute
ne disrompiĝis ja tre
en pecojn, ho ve!”

Jadranka Miric (Serbujo)



Januara poemo

Pluventas
tutnokte. Poste
neĝis. Blankiĝis ĉio.

Hundoj ĝojiĝas veste.
Frosto ĝisoste.

Malvarmas.
Glaciĝis lago.
Nuda branĉaro gajnis
blankajn vestaĵojn. Tago
je vintra ago.



Skiado,
glitveturado,
ĵetado de neĝbuloj,
nepra vintra ĝuado.
Freŝa spirado.

Naturaj
bird’ rendezvoj
por manĝeti.. Paneroj
ĉe fontano. Blanka voj’.
Aŭdiĝas pepoj.

En aer’
stele ŝvebantaj
neĝeroj. Neĝa kurten’.
Homoj ĝoje krietantaj,
kore ridantaj.

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksfirma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimarango xa,xa,a (x=senrima).*

Lily (Ĉinujo)

Kruela amato

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

Jam
estingiĝis l’ arda flam’

enkore
de l' unua am'.

Li
vanuis sen mia sci'
senkaŭze
sen adiaŭ, fi!

Sur
lit' ankoraŭ lia spur'
videblas
dum volupt-plezur'.

Kis'
lia sentiĝas jen ĝis
nuntempe
ankoraŭ sen mis'.

Ĝu'
brakuma ĉe rendevu'
ja restas
en memoro plu.

Kor'
mia batas kun fervor'
senĉese
pro lasta amor'.

Lud'
lasciva sub lia trud'
malvestis
min en plena nud'.

Kat-
simile mi jen kun flat'
obeis
tre laŭ lia ŝat'.

En
lit' orgiis ĝis maten'
laŭplaĉe
li kun la siren'.

Dum

geiĝ' en mia brakum'
li tordis
sin kun laŭta zum'.

Post
lud' li laciĝis ĝis ost'
kaj dormis
kvazaŭ ligna fost'.

Sed
ĉion mi mole per ced'
akceptis
ĝis mia graved'.

Mal-
fidelas kiel ŝakal'
kruele
li kun hont-vual'.

Ve,
skandale ĝis apoge'
li premas
min ja al pere'.

**Deskses-Silabo: ĉina fiksfirma poemo el kvar versoj
de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)*

Lao She (1899-1966)



La stepo

Ĉifoje mi vere vidis la stepon.
Tiea ĉielo estas pli aminda ol en aliaj lokoj. La
aero estas tiel freŝa kaj la ĉielo estas tiel
serena, ke mi emas kanti kanton por esprimi
mian plenan ĝojon en la koro. Sub la ĉielo
etendiĝas verda vastaĵo de mil lioj, sed ne kun
sovaĝeco. Ĉirkaŭe sin trovas montetoj. Verdaj
estas ambaŭ ebenejo kaj montetoj. Aro da
ŝafoj jen suriras monteton jen malsupreniras
de ĝi. Kien ajn la ŝafoj iras, ili ŝajne brodas
grandajn blankajn florojn sur la senlima verda
tapiŝo.

La konturoj de la montetoj estas tiel mildaj kaj belaj, ke ili aspekte similas al ĉina pentraĵo plene tuĉita nur per verda koloro sen nigraj strekoj. Ĉie junverdo inundas kaj delikate fluas en nubojn. Tia pejzaĝo ne nur admirigas, sed ankaŭ komfortigas, tiel ke la vizitantoj emas stari longe por pririgardi ĉirkaŭen, kaj ankaŭ sidiĝi por reciti poemon pri mirinda beleco. En tiu ĉi pejzaĝo eĉ stalonoj kaj bovegoj kelkfoje staras senmove, ŝajne remaĉante la senliman plezuron de la stepo.

La loko, kiun ni vizitis, estas la Chenbartu-Flago*. Irinte cent kvindek liojn, la aŭto, per kiu ni veturis, atingis la cellokon. En la spaco de cent kvindek lioj etendiĝas nur herbejo, kaj se oni veturas alian spacon de cent kvindek lioj, vidiĝas ankoraŭ herbejo. Estas facile kaj libere veturi peraŭte sur stepo. Se oni nur veturas en la ĝusta direkto, estas ne malbone iri tien kaj alien. Komence kiam ni eniris la stepon, ni aŭdis nenian voĉon kaj vidis nenion, krom birdoj jen leviĝantaj jen malleviĝantaj. Post longa veturado vidiĝis malproksime kurba rubando klara kiel glaco. Rivero! Bovoĵ kaj ŝafoĵ plimultiĝis, vidiĝis gregoj da ĉevaloj, aŭdiĝis malklaraj vipofrapoj. Baldaŭ, ni baldaŭ atingis la cellokon. Subite aperis, kvazaŭ alportita de vento, sur malproksima monteto grego da ĉevaloj, sur kiuj la rajdantoj, viraj aŭ virinaj, junaj kaj maljunaj, estis vestitaj kolorriĉe. Algalopis ĉevaloj kun svingantaj baskoj de vestoj kaj jupoj de la rajdantoj, kvazaŭ alflugus al ni ĉielarke. Jen ili estis gastigantoj venantaj fore de kelkdek lioj por bonvenigi la gastojn el malproksimeco. Kiam ili nin vidis, ili, turninte la kapon de ĉevaloj, galopis kun hurado, ĉe ambaŭ flankoj aŭ en la fronto de nia aŭto por gvidi al ni la vojon. La kvietaj stepoj tuj bolis tute de hurado, aŭta muĝado kaj sonoj de ĉevalhufoj. Sekvante la ĉevalojn, la aŭto flugis trans la monteton kaj kelkaj jurtoj falis en niajn okulojn.

Ekster la jurtoj troviĝis multaj ĉevaloj kaj

aŭtoj. Multiĝis homoj, kiuj de malproksime kelkdek liojn alvenis per ĉevalo aŭ aŭto vidi nin. La gastigantoj deĉevaliĝis kaj ni elaŭtiĝis. Ni varme premis la manojn sendistinge, ne volante deŝiri unu de la alia. Kvankam ni parolis malsamajn lingvojn, ni tamen havis la saman koron. Manpremo post manpremo, ridado post ridado. Diversaj eldiroj ĉiel signifis unuiĝon kaj kunhelpon de la naciecoj. Ni ne sciis, kiel ni eniris jurton. Alportiĝis laktoteo kaj lakta toufujo. Gastigantoj kaj gastoj ĉiuj sidiĝis sur la krucitajn kruojn antaŭ si, tre ĝentilaj, intimaj kaj senceremoniaj. Post nelonge la gastama gastiganto enportis grandan pladon da ŝafaĵo per mane disŝirebla dum manĝado. Kadroj kaj sepdekjarulo proponis toston al ni kaj ni reciprokis toston. La gastiganto levis pokalon kaj ni reciprokis toston. Post tio junulinoj el Owenk-nacieco, kun pinta ĉapo sur la kapo, senĝenaj sed iom hontemaj, alvenis kanti popolkantojn por gastoj. Kaj la kantistoj el ni ankaŭ tuj respondis per kantado. Ŝajne la kantvoĉo estis pli sonora kaj kortuŝa ol ajna lingvo. Kion ajn ili kantis, la aŭskultantoj montris komprenan rideton.

Post manĝado junuloj prezentis lazadon de ĉevaloj kaj luktadon, kaj junulinoj naciecajn dancojn. Ankaŭ kelkaj gastoj dancis kaj kelkaj kantis. Kaj ili volis prove rajdi mongolan ĉevalon. La suno jam kliniĝis okcidenten, sed neniuj volis disiĝi. Jes! Kun profunda sento mongolanoj kaj han-anoj ne volis disiĝi unu de la alia eĉ ĉe sunsubiro sur la stepo!

**Flago estas administra distrikto sub la Aŭtonoma Regiono de la Interna Mongolio, proksimume egala al gubernio.*

elĉinigiĝis Vejdo (Ĉinujo)

◇◇

Eldonas Redakcio de *Penseo*

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)

Retadreso: vejdo@163.com

Por legi pasintajn numerojn de *Penseo*, vin turnu al www.elerno.cn/penlisto.htm

◇◇